**N I A V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Ekde 1985 redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **SEPTEMBRO-OKTOBRO 2009**

UEA ne elektis Madridon kiel sidejo de la UK-2011, ĝi okazos en Kopenhago.
Ĉe HEF jam oni parolas pri la kandidateco por Madrido-2013

## CENTJARIĜO DE LA 5-a UK en BARCELONO

La programo kiu rememoras en Katalunio la UK-n preziditan de D-ro Zamenhof, kiel ni jam informis, komenciĝis per solena ceremonio en salono de la Urbodomo de Barcelono.

En majo, Barcelona Esperanto-Centro, organizis ekspozicion de esperantaĵoj en kies inaŭguro prelegis R. Urueña kaj Dolors Marín. Ankaŭ prezentis la DVD-n, parte subtitolita en esperanto, pri la kataluna folkloristo Joan Amades i Gelats. Reprezentantoj de e-grupoj de Katalunio paroladis kaj rakontis anekdotojn pri la 5-a UK.

**EN HISPANIO**

En **HEF-oficejo okazis brulego** frumatene pasintan 29an de julio. Temis pri provokita brulego en la oficejo 3 de la dua etaĝo (ĝi estas oficejo de ekstremdekstra junulara organizo). La HEF oficejo estas en la tria etaĝo. La brulego okazigis grandan damaĝon en kelkaj oficejoj kaj en la dua etaĝo mem, sed ĝi feliĉe ne atingis la trian. Do, preskaŭ okazis katastrofo: kvankam la HEF-oficejo havas asekuron, kaj la informon de la komputiloj preskaŭ semajne estas kopiata por havi ĝin ekstere, la Biblioteko estas tute neanstataŭebla.

**"Platero kaj mi"** de J.R. Jiménez estis prezentita en la Malaga Kongreso ene de la kolekto Hispana Literaturo

Dum la Kongreso de Malago kelkajn gelernantojn oni ekzamenis laŭ la **nova metodo de ILEI.** Ĉiuj atingis diplomojn.

La revuo "Literatura Foiro", organo de PEN-centro (N-ro 239 junio 2009) dediĉas kelkajn paĝojn al **Malago**: Recenzo pri la traduko de Andrés Martín de la libro "La rigardo retrovita", de Víctor M. Heredia Flores, artikolo "La pionira urbo" pri Malago kaj tradukoj de Salvador Rueda de diversaj "coplas".

Esperanta Jura Asocio, kunlabore kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, eldonis la 8-an numeron de **"Jura Internacia revuo".** La revuon oni prezentis dum la kongreso de Esperanta Jura Asocio, okazinta kadre de la Universala Kongreso en Bjalistoko. En la 50 paĝoj de la revuo aperas ĉefe artikoloj pri juraj temoj, informoj pri la interna vivo de Esperanta Jura Asocio kaj tradukaĵoj de internaciaj traktatoj kaj de rezolucioj de Unuiĝintaj Nacioj.

La **TV**-programo "Redes" ene de la temo Socia Psikologio inkludis intervenon de katalunaj esperantistoj

La 2an Aŭgusto aperis favora artikolo pri la UK en **El Norte de Castilla**

En junio, valenciaj esperantistoj starigis budon en la **Alternativa Foiro de Valencio**. Ankaŭ deĵoris e-volontuloj de Katalunio

Dum la ILEI-konferenco en Krakovo (Pollando) 6 hispanoj petis la refondiĝon de la Hispana **ILEI-sekcio.** Ankaŭ ili volus inviti por ke la ILEI-konferenco de 2011 okazu en Valencio. La hispanaj (aŭ ne hispanaj) membroj de ILEI kiuj volas esti membroj de la hispana sekcio, kontaktu Augusto Casquero. Kotizo kostas 4 eŭrojn, kun la revuo Pedagogia Revuo rete.

**ESPERANTA MONDO**

Ĉu vi scias ke…? Esperanto estas daŭre reprezentata ĉe UN ne nur en Novjorko sed ankaŭ en Ĝenevo kaj Vieno, kaj ĉe UNESKO en Parizo. En aprilo 2008 en la UN-Domo en Ĝenevo, UEA organizis tuttagan simpozion pri lingvaj homaj rajtoj. De tempo al tempo okazas aliaj ekzemploj de tia kunlaboro pri temoj de komuna intereso inter UEA kaj

**UNESKO kaj UN**. En junio 2009 la Prezidanto de UEA prezentis al UNESKO informon pri la kontribuo al la “Internacia Jaro de Lingvoj”.

Preskaŭ 40 hispanoj aliĝis al la **UK de Bjalistoko**, inter ili Angelita Sanz, Pedro Hernández kaj Miriam

Meze de junio finiĝis en la ĉina urbo Foshan, en la Altlernejo pro Porprofesiaj Studoj, kurso de esperanto gvidata de **Augusto Casquero**

Elŝuteblas libere el la reto la 17a numero (Julio 2009) de "La Karavelo", eldonita en **Portugalio** <http://www.lakaravelo.com/>

**"UEA viva",** 10-minuta filmĵurnalo pri UEA, TEJO kaj Centra Oficejo, pri novaj libroj, http://www.youtube.com/UEAviva

Nova retpaĝo de **Radio Habana** www.radiohc.cu/esperanto

## Eŭropa Unio financas peresperantan tradukprojekton de infanlibroj

EU financas per 64 000 eŭroj la projekton, en kiu infanlibroj, kun Esperanto kiel ponto-lingvo, estos tradukitaj inter la bengala, itala, slovena kaj kroata lingvoj, kaj poste distribuitaj en elementaj lernejoj.

Partoprenos Kroata Esperanto-Ligo kaj kiel partneroj Edistudio el Pisa (Italio), Inter-kulturo el Maribor (Slovenio) kaj barata eldonasocio Samatat Siksha Samatat Prakashan el Kalkuto. Ĝi estis aprobita de kulturfonduso de Eŭropa Komisiono (EACEA Culture). La partneroj tradukos el siaj lingvoj unu infanlibron de sia literaturo al Esperanto. Poste la barata partnero plutradukos la tri eŭropajn librojn el Esperanto en la bengalan, kaj la tri eŭropaj partneroj tradukos la baratan libron ĉiu al sia nacia lingvo.

La librojn, oni distribuos en elementaj lernejoj de siaj urboj kaj organizos legokonkurson inter la infanoj. La plej bonaj verkoj de la infanoj pri libro legita kaj apartenanta al alikontinenta kulturo estos premiitaj.

**Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo**
3a ĝis la 10a Oktobro en Pineda de Mar (Maresme, Barcelono)
luis_serrano@mixmail.com kaj luis_serrano@ya.com

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ekde la 14-a de septembro Niaj konversacia-rondoj okazas **ĉiulunde**, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

19a ĝis 31a de oktobro. Ekspozicio “El Esperanto: desafío a Babel”
Salón Primavera. Casa del Reloj c/ Paseo de la Chopera. Junta Municipal Arganzuela.

**NIA VOĈO ŜERĈAS NOVAN REDAKTORON**

Ĝis nun MEL ricevis neniun oferton por okupiĝi pri la redaktado de Nia Voĉo. Lupe jam anoncis ke ŝia lasta numero estos en marto 2010. **Estos bedaŭro ke unu el la plej antikvaj hispanaj e-revuoj en Hispanio, kaj la plej ofta, malaperu**. Ĉu vi deziras esti redaktoro?

Darío Rodríguez

# INTERRETA RUBRIKO

Toño del Barrio kreis kurseton de esperanto en la socia retejo Twitter. Ĝi estas socia retejo, kie homoj sendas tre mallongajn mesaĝojn (ĝis 140 literoj), kvazaŭ mikro-blogo. Li ekhavis la ideon uzi tiun rimedon por fari kurseton pri esperanto por hispanlingvanoj. Ĝi donus po unu lecione-ton ĉiun tagon. La reta revuo *Libera Folio* aperigis artikolon pri ĉi nova kurso, kun informoj de la kreinto kaj diversaj inte-resaj opinioj, legebla ĉe *www.liberafolio.org/2009/kvitero*

La kurso ĉe Twitter videblas ĉe *twitter.com/cursoesperanto*

Pasintfebruare konata krimea esperantisto Paŭlo Moĵajev faris furoran prezenton de esperanto en populara ruslingva blogo Livejournal. Scipovantoj de la rusa povas sekvi la konsiderindan kvanton da demandoj kaj respondoj kiujn tiu prezento vekis ĉe *tema.livejournal.com/275854.html?thread=119180942#t119180942*

Pri tio informas ruslingva novaĵ-agentejo pri esperanto Esperanto-novosti ĉe *www.e-novosti.info/blog/17.02.2009/2*, ankaŭ ruslingve. Sed eblas uzi la tradukilon de Google el la rusa al la kataluna: *translate.google.com*, tial ke temas pri interesega diskuto.

Entute rus(lingv)aj esperantistoj montriĝas tre aktivaj kaj sukcesaj en interreto. En la ruslingva socia retejo VKontakte aliĝis pli ol 10 000 homoj al la grupo "Esperanto". Vidu ĉe *vkontakte.ru/club48182*

UEA decidis aktualiĝi uzante la eblecojn de filmo-retejoj. Komence ĝi enretigis ok filmetojn pri la aprila Malferma Tago de la Centra Oficejo en Roterdamo, al kio aldoniĝas nova serio aperonta periode kun la plej aktualaj temoj de UEA, kvazaŭ filma prezento de la konataj "Gazetaraj Komunikoj de UEA". La filmetoj spekteblas ĉe la jenaj adresoj: *www.ipernity.com/doc/97850/home/video* kaj *www.youtube.com/UEAviva*

Kvankam ne temas pri esperanta paĝo, niaj legantoj interesiĝantaj pri la Internacia Fonetika Alfabeto povas mem aŭdi la sonojn de la ĉefaj fonetikaj simboloj en jena paĝo: *web.uvic.ca/ling/resources/phonlab/ipatut/index.html*

La novelaro *Marvirinstrato*, de Tim Westover, estas senpage elŝutebla. Pluraj el la noveloj de tiu verko ricevis premion en la Belartaj Konkursoj de UEA. La retadreso estas: *timwestover.com/marvirinstrato/?page_id=7*

Ampleksa studo de Henri Masson pri la trudo de la angla lingvo en Francio kaj tutmonde legeblas ĉe la adreso: *www.esperanto-sat.info/article1391.html*

José Rodríguez kreis blogon, per kiu eblas spekti plurajn filmetojn subtitolitajn en esperanto: *subtekste.blogspot.com*

Aperis nova reta scienca revuo en esperanto. *Teleskopo* estas scienca revuo aperanta surrete por publikigi internacilingve artikolojn pri diversaj sciencaj fakoj, kiuj povas esti elŝutataj senpage el jena adreso en PDF-formato (individuaj artikoloj aŭ la tuta revuo): *www.teleskopo.com/unuaeldono.htm* ❑

## Interreta rubriko

Aperis filmo "Esperanto estas" kiu prezentas nian lingvon laŭ moderna kaj vigla maniero. La filmo, dividita je ses partoj, kreiĝis kadre de la organizo E@I – www.ikso.net. Eblas aĉeti ĝin kiel DVD, kun sonversio elektebla inter esperanta, germana, angla, franca, itala kaj portugala, kaj kun subtitoloj en la kataluna, hispana kaj aliaj 27 lingvoj (oni petas kunlaboron por dubli la sonon al aliaj lingvoj). La filmo spekteblas ĉe la adreso: *esperantoestas.blogspot.com*

Klivo Lendon estas usona esperantisto, kiu de antaŭlonge laboras kiel programisto en Japanio. Li kreis plurajn inĝeniajn ilojn por esperantistoj. Per lia"Gramatikilo" eblas tajpi simplajn frazojn, kiujn la sistemo analizas gramatike. "Ĉapelludo" estas ludilo, kiu proponas multajn tekstojn sen supersignoj kaj montras kolekton da ĉapelaj bildetoj, kiujn oni devas movi per la muso lokante ilin super la koncernajn konsonantojn. "Litertriso" estas ludilo por krei vortojn per literoj, kiuj falas de supre kaj kiujn oni devas loki adekvate per la sagoklavoj. La programoj funkcias per ĝavo en ĉiuj mastrumaj sistemoj.

*www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/gramatikilo*
*www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/chapelludo*
*www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/litertriso*

Ĵus aperis "Reta Terminaro". Ĝi celas esti iaspeca "supervortaro", kiu serĉas la deziratan vorton en tri terminaroj: ReVo, Majstro kaj Komputeko. Kvankam ankoraŭ ne plene ellaborita, indas provi ĝin: *www.kono.be/rete*

Vikipedio en esperanto superis en marto 2009 la kvanton de 112 000 artikoloj: *eo.wikipedia.org/wiki/ĉefpaĝo*

La fama desegnofilmo por instruado de esperanto "Mazi en Gondolando" estas elŝutebla laŭ kvalita prezento (formato avi), en du partoj mezurantaj entute 547 MB, el la paĝo *javabog.dk/filmoj_en_esperanto/mazi_en_gondolando*

En la sama paĝo elŝuteblas versio MP4, taŭga por poŝtelefonoj kaj similaj iloj.

Malpli kvalita versio (formato flv) en 12 partoj elŝuteblas per Youtube: *www.youtube.com/watch?v=mWbyXVSiCxw*

En la dokumenta paĝaro de UEA legeblas interesa artikolo de Amri Wandel pri "IKU [Internacia Kongresa Universitato] kaj esperanto en la scienco kaj tekniko". Oni memoru, ke en ĉi paĝaro elŝuteblas kolektoj da prelegoj okazintaj kadre de la sesioj de IKU dum la lastaj Universalaj Kongresoj de Esperanto: *www.uea.org/dokumentoj/IKU/index.html*

Darío Rodríguez

Post plurmonata laboro la PS-teamo ĵus finpreparis la aliĝsistemon de la nova retejo http://www.pasportaservo.org kaj por la unua fojo, ni petas vin plenumi anstataŭ la ĝis nun kutima papera aliĝilo la tutnovan retan aliĝilon. La reta aliĝo plenumas la saman funkcion: Vi aperos kiel gastiganto de Pasporta Servo en la PS-libreto, kaj en la nova retpaĝo http://www.pasportaservo.org.

Simple iru al http://www.pasportaservo.org/ kaj alklaku *Membriĝi,* supre en la paĝo. Post plenigo de la kampoj kaj akcepto de la uzokondiĉoj, vi ricevos pasvorton en via retpoŝto. Per ĉi tiu pasvorto vi povas eniri la paĝaron kaj poste aldoni detalojn pri gastigado. Ne forgesu eniri la paĝon post ricevo de la pasvorto kaj tie aldoni la gastigo-detalojn, ĉar alikaze neniu povos kontakti vin pri gastigo!

*Kiel mi aliĝu al la nova sistemo?* Simple iru en la retejon http://www.pasportaservo.org/ kaj klaku al ...

*Mi ja pretas aliĝi en la reto, sed tamen volas, ke gastoj anoncu sin telefone aŭ per paperletero. Kion fari?* Tamen aliĝu en la reto, kaj simple indiku ke gastoj kontaktu vin nur per telefono aŭ paperpoŝto.

*Mi ne volas, ke miaj telefonnumero kaj adreso aperu en la interreto, ĉu mi tamen aliĝu?* Senprobleme! Vi povas facile elekti, ke viaj adreso kaj telefonnumero ne aperu en la interreto, kaj ke gastoj kontaktu vin per la retpaĝo sen vidi vian retadreson.

*Kiam malfermiĝos la nova retejo http://www.pasportaservo.org/ ?* La retejo malfermiĝos laŭplane la 8-an de majo.

*Mi faris eraron kiam mi entajpis miajn datenojn, aŭ poste ŝanĝis mian telefonnumeron. Kion mi faru?* En la nova sistemo, tio ne plu estos problemo! Vi facile povas ensaluti kaj ŝanĝi viajn datenojn.

*Kiam aperos la papera eldono?* Ĝi aperos komence de junio 2009.

*Ĝis kiam mi povas aliĝi por aperi en la venonta papera eldono?* Ni petas, ke vi aliĝu plejeble baldaŭ, sed almenaŭ ĝis la 17-a de majo de 2009.

*Mi volas aliĝi kiel gastiganto, sed preferas paperan aliĝilon. Al kiu mi min turnu?* Bv. sin turni al la Centra Oficejo de TEJO/UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Vi povas aliĝi eĉ per telefono! Simple alvoku la Centran Oficejon kaj petu la TEJO-oficejo dum ofic-horoj, lunde - vendrede de 9-a ĝis 16-a, tel: +31 10 43 6 1044



Kara PS-gastiganto, *ni multe dankas al vi pro via subteno de Pasporta Servo*. Ni dankas al vi ankaŭ pro via pacienco, kiun ni postulis pro la novprogramado de la retpaĝo. Ni esperas, ke danke al la nova teknologio kaj via daŭra subteno PS havos prosperan estonton.

Sincere salutas vin Joop Kiefte, PS-komisiito, Gregor Hinker, prezidanto de TEJO

❄ ❄ ❄

# Pasporta servo 2009